

4a DIMANĈO DE ADVENTO – 20-a de decembro 2015

PRO KIO LA PATRINO DE MIA SINJORO VENAS ĈE MIN? - Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Pro kio la patrino de mia Sinjoro venas ĉe min?

El la evangelio laŭ Luko 1, 39-45

En unu el tiuj tagoj Maria leviĝis kaj senprokraste ekvojaĝis al la monta regiono, en urbon de Judeo. Enirinte la hejmon de Zakario, ŝi salutis Elizabetan. Kiam Elizabeta ekaŭdis la saluton de Maria, tuj la bebo saltetis en ŝia ventro; ŝi pleniĝis per la Sankta Spirito, kaj laŭtvoĉe ekkriis: „Benita vi inter ĉiuj virinoj; kaj benita la frukto de via sino! Pro kio la patrino de mia Sinjoro venas ĉe min? Tuj kiam la voĉo de via saluto atingis miajn orelojn, la bebo pro ĝojo skuiĝis en mia ventro. Feliĉa, kiu fidis la Sinjoron, kaj kredis, ke plenumiĝos anonco Lia!“.

Luko estas la evangeliisto, kiu pli ol la aliaj prezentas al ni kvazaŭ pentre la bildon de Maria, la patrino de Jesuo. Ni vidu kion li skribas por ni en ĉi tiu kvara dimanĉo de Advento. Antaŭ ĉio, kiel lia rakonto ligiĝas al la antaŭaj eventoj. Jam okazis la anonco, jam anĝelo Gabrielo petis de Maria, ke ŝi kunagu por la propono de Dio, iĝante la patrino de Lia filo. La reago de Maria estas io neimagebla laŭ la tiutempa kulturo. Tiutempe virino rajtis decidi nenion ne konsultinte la patron, la edzon, eĉ filon, kaj ricevinte nenies aprobon. Maria petas aprobon de neniu viro: ŝi decidas sola: io neimagebla. Kaj kio sekvas estas eĉ pli absurda. Ni legu plu.

“En unu el tiuj tagoj Maria leviĝis kaj senprokraste ekvojaĝis al la monta regiono, en urbon de Judeo”. La anĝelo estis dirinta, ke ŝia parencino Elisabeta estas graveda; eĉ post la anonco de ŝia baldaŭa patrineco, ŝi ne postulas zorgojn nek omaĝojn, sed ekservas.

Luko intencas komprenigi, ke ĉiu aŭtentika sperto pri la Spirito signifas servadon. Kaj kia servo! Ŝi ne aliĝis al karavano, sed ekmarŝis al Judeo. De Galileo al Judeo la vojoj estis du: unu, pli longa sed pli sekura, pasis tra la valo de rivero Jordano; la alia, malpli longa, estis danĝera, ĉar ĝi pasis tra la montoj de Samario.

Ni scias, ke judoj kaj samarianoj estis malamikoj. Al vojaĝo tra monta regiono aldoniĝis risko pri la vivo mem. Sed por Maria la deziro servi, komuniki vivon, estis pli grava ol la risko de danĝeroj. Do ŝi haste forvojaĝas.

"Enirinte la hejmon de Zakario, ŝi salutis... kaj ni atendus "... la dommastron". Ne, "...Elizabetan", la edzinon. Nekredeble. La unua saluto decas al la dommastro. La saluto de Maria estas por Elizabeta: renkontiĝas du virinoj, kies gravedecoj estis neblaj: unu pro sterileco, la alia pro virgeco.

Do Maria eniras kaj salutas, kiel agis la anĝelo kun ŝi. *"... Kiam Elizabeta ekaŭdis la saluton de Maria,..."* La saluto ne estas formalaĵo aŭ bondeziro, sed beno. *"...tuj la bebo saltetis en ŝia ventro; ŝi pleniĝis per la Sankta Spirito..."*. La evangeliisto anticipas, kion poste plenumos Jesuo, la bapton en la Sanktan Spiriton, la trempon de ĉiuj personoj en la plenon de la amo de Dio.

"... kaj laŭtvoĉe ekkriis: ...en la hejmo de la pastro ne kredema, - kaj pro tio mutiĝinta – la virino rolas kiel profeto: "Benita vi inter ĉiuj virinoj ...". Per tiuj vortoj estas glorata Jaela, heroino en la milito kontraŭ Kanaanidoj (Juĝ 5,24), *"... "kaj benita la frukto de via sino!"*. Tio estas ŝoka! Nur unufoje en la tuta Malnova Testamento estas menciita frukto de la sino, sed pri viro, la fidelulo al la Sinjoro. Ĉi tie Luko aludas al Maria, kun la sekvo *"... Pro kio la patrino de mia Sinjoro",* tio signifas de la mesio, *"venas ĉe min?"*. Jen aludo al alia epizodo, kiam la sankta kesto kun la leĝtabuloj de la alianco estis dumtempe lasita ĉe iu, kiu mirante diras *"Kial la reĝo mia Sinjoro venas ĉe sian serviston?"*

...Tuj kiam la voĉo de via saluto atingis miajn orelojn, la bebo pro ĝojo..." (laŭvorte: "jubile")... *skuiĝis en mia ventro"*. Jen la unua anonco de beateco en la evangelio.

"...Feliĉa, kiu fidis la Sinjoron, kaj kredis...". En la proklamo, ke Maria estas beata, kaŝiĝas riproĉo de Elizabeta al sia edzo Zakario, kiu male ne kredis *"...ke plenumiĝos anonco Lia"*. La virga Maria kredis la planon de Dio, kaj ŝi proklamiĝas "beata". Tio estas la unua proklamo de beateco en la evangelio. La lasta estas en la evangelio de Johano (Joh 20, 25) *"Beataj tiuj, kiuj kvankam ne vidinte kredos"*

Inter tiuj du proklamoj de beateco enfermiĝas la vivo de Maria. Kion signifas tiu proklamo? Maria komprenis – kaj se la eklezio proponas ŝin al ni kiel ekzemplon de fido, tio validas ankaŭ por ni – ke ŝi apartenas al unika eksterordinara plano de amo. Kaj ke ĉio de ŝi travivota, ĉu bona ĉu malbona, celas nur plenumon de tiu plano.

Tiu Maria estas la modelo por la kredantoj proponata de la eklezio.